

# ESPERANTA FINNLANDO

1961

N:o 2

## INFORMILO DE FINNLANDAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

**JARKOLEKTO 1961 — 9 numeroj**

Abonprezo enlanda 350 mk  
eksterlanda 450 mk  
aŭ 12 respondkuponoj

Bonvolu prefere aboni per la ĝirokonto  
8392 aŭ senpere en la poŝto.

Adreso de la administrejo (abonoj kaj  
anoncoj): Männikkötie 5 M 67,  
MAUNULA

Redakcio: Vilho Setälä, Kaarlo Jokinen, Emil Stenholm, Simo Raumavirta.

Redaktejo: Esperantotie 4, MATINKYLÄ (artikoloj, novaĵoj, recenzoj, intersaĝo de gazetoj)

Ĉiuj esperanto-organizaĵoj, kluboj kaj societoj estas varme petataj konstante kontribui per novaĵoj kaj interesaj artikoloj, proponoj ktp., por ke nia gazeto estu vera komuna informilo.

## Innostavia uutisia Jugoslaviasta

Zagrebin nuoret tähtitieteilijät ovat ryhtyneet Zagrebin observatorion piirissä luennoimaan säännöllisesti myös esperantoksi.

Saman observatorion esperantisti-astronomit ovat kirjoittaneet kautta maailman suurta huomiota herättäneen kirjan »Tragedio en universo», jota parhaillaan käännetään 18 eri kielelle. Kirjasta on tehty käsikirjoitus myös samannimistä filmiä varten, jonka filmaukseen ryhdyttäne lähiaikoina. Filmin puhekielenä tulee olemaan esperanto.

Edelleen on ehdotettu kuun vielä nimeämättömille kraatereille annettavaksi nimet »Zamenhof» ja »Esperanto».

Nuorten esperantisti-tähtitieteilijäin ryhmä rakentaa parhaillaan radioalan asiantuntijain avustamana omaa radioasemaa, joka tulee lähettämään ohjelmaa yksinomaan esperantoksi.

Koko maailman esperantistien käyttöön on Adrianmeren rannalle

PRIMOŠTEEN perustettu »ESPERANTUJO» lomakeskus, alueelle jossa vallitsee ikuinen kesä. Kylminäkin kuukausina tammi-helmikuussa kukkivat siellä ruusut ja oljanderit ja merivesi on sopivanlämmintä uintia varten ja sää on sumuton ja aurinkoinen. Valuuttasuhteista johtuen hinnat ovat vain puolet muiden vastaavien paikkojen hinnoista. Loma-asioista kiinnostuneet voivat saada tarkempia tietoja allekirjoittaneelta V. J. Kostiaiselta, os. Hämeenlinna. Vietin viime kesänä lomani Adrian merellä.

Kuluvan helmikuun 15 päivänä Välimeren piirissä näkyvän täydellisen auringonpimennyksen ajaksi järjestävät Zagrebin observatorion nuoret esperantisti-tähtitieteilijät yhdessä Jugoslavian toisten observatorioiden kanssa auringonpimennys-havaintoaseman Braĉiin, johon saapuu tiedemiehiä kautta maailman tekemään havaintoja harvinaisesta luonnonilmiöstä.

V. J. K.

## Esperanton asema vapaassa kansansivistystyössä

Kesäkuun 10—12 p:nä Lahdessa pidetyssä VIII. yleisessä kansansivistyskokouksessa kosketeltiin myös kansainvälistä kieltä

»KASVATUS KANSAINVÄLISYYTEEN» nimisen alustuksen yhteydessä. Alustuksessa korostettiin vieraiden kielten opiskelun tärkeää merkitystä välittömän kosketuksen aikaansaamisessa vieraisiin kansoihin ja vieraskieliseen kirjallisuuteen ja perehtymisessä asianomaisen kielialueen elämään ja kulttuuriin, minkä puolestaan todettiin edistävän kansainvälistä ymmärtämystä, ja suositeltiin yhden vieraan kielen ottamista kansanopistojen opetusohjelmaan, kielilevyjen yleisempää käyttöä opetuksessa, kielenopetuskesäkursseja, apurahojen myöntämistä osanottoa varten ulkomaisille kursseille, konferensseihin ja opintomatkoihin, kansainvälisten kurssien järjestämistä julkisin varoin, kansainvälisten asioiden käsittelyä kansansivistystyön vaikutuspiirissä filmien, radion ja television avulla, valtionavun ja veikkausvarojen käyttöä kansainvälistä kasvatusta edistäviin tarkoituksiin, kansainvälisten kysymysten instituutin perustamista ja erityisen neuvottelukunnan asettamista kansainvälisen kasvatuksen suunnittelua ja edistämistä varten.

Alustuksen vieraiden kielten opetusta koskevassa kohdassa ei mainittu erikseen mitään vierasta kieltä, vaan vasta keskustelussa kävi ilmi, että vieraiden kielten opiskelulla tarkoitettiin miltei yksinomaan englantia. Keskustelun kuluessa maisteri Vilho Setälä korosti Esperanton merkitystä kansainvälisenä kielenä ja UNESCO:n omaksumaa myönteistä kannanottoa siihen ja ehdotti ponsiin seuraavat lisäykset:

»1. Kaikessa opetuksessa olisi korostettava sitä, että kansainväliseen vuorovaikutukseen pyrittäessä kansainvälinen kieli on erinomaisena apuneuvona, koska sen avulla päästään välittömään vuorovaikutukseen monien vieraiden kansallisuuksien kanssa täysin puolueettomalla pohjalla ja tasa-arvoisena keskustelu- tai kirjeenvaihtoverin kanssa.

2. Opittavaa kieltä valittaessa on kiinnitettävä huomiota siihen, että Esperanton opiskelu muodostuu tarkoituksenmukaiseksi, koska se on puolueeton silta kaikkiin maihin, Esperanto on helpommin opittavissa kuin mikään muu kieli, Esperanton opiskelua varten on saatavissa mitä uudenaikaisimmat opintovälineet — luonnonmenetelmän mukainen oppikirja ynnä ääniraina audiovisuaalisena apuneuvona, opettajapula on helposti voitettavissa, koska kuka tahansa kielten opettaja oppii Esperanton ilmiömaisesti nopeasti, oppilaat saattavat jo viimeistään 30 oppitunnin jälkeen ryhtyä käyttämään kieltä kansainväliseen kirjeenvaihtoon.

3. Erityisesti on julkisia varoja jaeltaessa otettava huomioon ne kansainväliset kurssit ja konferenssit ym., joissa Esperanto on ainoana keskustelukielenä, koska näillä aika voidaan tehokkaasti käyttää päätarkoitukseen, tarvitsematta sitä tuhлата tulkintoihin.

4. Radion ja television tulisi tukea kansainvälisten vuorovaikutusten mahdollisuuksien lisäämistä, antamalla opetusta kansainvälisessä kielessä.

5. Samalla kun Esperanton avulla toteutettavaa kansainvälistä kasvatusta ja vuorovaikutusta ei tule unohtaa julkista tukea annettaessa, olisi Suomessa pyrittävä yhteistointaan muiden valtioiden, etenkin pohjoismaiden kanssa tämän tuen järjestämiseksi kansainvälisellä pohjalla, nimenomaan myös koulutoimen osalta.

6. Neuvottelukunnassa olisi varattava paikka myös Suomen Esperanto-opiston kannatusyhdistyksen edustajille.»

Maisteri Setälän ehdotusta kannattivat sosiaalijohtaja Tauno Suontausta ja tark. V. J. Kostiainen. Kansansivistystyön eturivissä toimivat työväenopistojen, kansanopistojen ja kansansivistysjärjestöjen johtajat sitävastoin asettuivat kansainväliseen kieleen täysin non possumus kannalle. Esim. Työväen Sivistysliiton taholla, jossa asia on sentään ollut vireillä jo yli 40 vuotta, ei ollut tapahtunut minkäänlaista edistystä, vaan liiton johtajat toistivat samoja tietämättömyyteen ja ennakkoluuloihin perustuvia väitteitä kuin 40 vuotta sitten, puhumattakaan korkeastioppineiden johtajien naivista väitteistä, joilla he vastustivat kansainvälistä kieltä. Vaikka keskustelussa kävi ilmi englanninkielen opiskelijain keskuudessa tapahtuva suuri kato ja heikot tulokset, ei se millään tavoin vaikuttanut heidän piintyneisiin ennakkoluuloihin perustuviin mielipiteisiinsä.

Koska keskustelun kuluessa kuitenkin useat kansansivistystyön kenttämiehet ja Kouluhallituksen edustaja asettuivat kansainväliseen kieleen nähden suopeammalle kannalle, annettiin Esperantoon liittyvien ponsien valmistelu puhemiehistölle seuraavana päivänä yleiskokoukselle esitettäväksi. Puhemiehistö ei kuitenkaan pannut tikkua ristiin asian hyväksi, vaan ehdotti hyväksyttäväksi alustuksessa esitetyt ponnet sellaisinaan, mikä sitten yleiskokouksen loppuvaiheessa kaikessa kiireessä tapahtuikin.

Tässä nähtiin jälleen, miten ennakkoluulot ja haluttomuus tutustua asiaan ovat työmme suurimpana vastustusmuurina. Tiedoitustoimintaa on yhä tehostettava ja aloitteet on tehtävä opiskelijain itsensä taholta ja valmistauduttava seuraavaa kokousta varten suuremmalla joukolla vastustusmuurin murtamiseen.

V. J. K.

Vilho Setälä.

## Noktoj en la Nordo

Elprenu vian kartaron, mi petas. Malfermu ĝin sur tia paĝo de la norda duonsfero, ke vi povas tie veturi meze inter la latitudoj 61° kaj 62° orienten, ĝis vi atingos la longitudon de 27° 30' de Greenwich. Tie, en la lagregiono de Finnlando vi trovos mian iaman hejmon sur la bordo de la bela lago Some, per kanaletoj ligitaj kun la vasta, milinsula Saimaa. Tie ni maldormos kelkajn noktojn.

### VINTRO.

La tagoj ĉiam mallongiĝis. La neĝo falis, la lagojn kovris forta glacio, sur kiu oni ĉie veturas per ĉevaloj kaj sledoj. En la Kristnaska tempo la suno aperas ĉirkaŭ la naŭa kaj duono kaj malaperas ree tuj post la dekkvina horo, tio estas post la tria post tagmezo. Kaj ĝia orbito estas tiel malalta, ke eĉ tagmeze ĝi nur malforte tuŝas la neĝajn ebenaĵojn. La deklivoj alnorde restas nelumaj eĉ dum la serenaj tagoj, kaj kiam pezaj neĝnuboj kovras la ĉielan volbon, tie regas konstanta krepusko.

Sed estas serenaj tagoj kaj ilin sekvas stelklaraj noktoj. Tiam la malvarmega neĝo knaras sub niaj kalkanumoj, kiam ni paŝas ekstere.

Sed ni fiksas skiojn sub niaj plandoj, kaj la bone grasŝmiritaj glitilegoj kiel vento portas nin suben laŭ la deklivo, al la ebena kovrilo de la vastaj akvoj. Nun, en la dudektridegrade (Celsiusaj gradoj!) frostata aero penetras trembrile la radioj de la senfine malproksimaj astroj: la Lakta vojo etendiĝas de horizonto al la alia. Estas tute senvente sub la firmamento, kaj tamen oni sentas, kiel la malvarmega aero avidas penetri sub niajn vestaĵojn. Sed estas aliaj noktoj ventegaj. La blovado puŝas antaŭ si la neĝon el la nuboj, la neĝo sur la glacio leviĝas antaŭ ĝia spirado alten, kaj kvazaŭ densa nebulo ĝi tegas ĉiujn formojn de la pejzaĝo. Sed tiu nebulo ne estas la subtila, senkorpa nebulo de la malvarmetaj printempaj noktoj. Kiel sableroj ĝiaj kristaloj batas niajn vizaĝojn, eniras de ĉiu fendo kaj kunkudro sub la vestaĵon. Feliĉa, kiu en tia vetero povas resti en la varmaj ĉambroj kaj sidi ĉe flagrantaj flamoj de la fornego.

Pasas la nokto. Malrapide la krepusko de la mallonga tago venkas la ombrojn de la nokto. Eble la uragano ĉesas. Kaj ĉion tegas la pure blanka tapiŝo neĝa sub sian kaŝman kovrilon. Eble eĉ la nuboj dispeliĝas kaj la sunradioj igas la mil kristalojn brileti per ĉiuj koloroj de la spektro.

---

## LA KALEVALA-TAGO

En fino de februaro estas ree la jubilea tago de Kalevala. Tial ni devas rememori pri la espranta eldono de nia nacia epopeo. Ankoraŭ mankas multe da mono! Sed ni havas la permeson de la interna ministerio al publika monkollektado. Ĉiu esperantisto devus helpi en tio. Kaj la laboro ne estas nur sinofero: ni donas taŭĝan kompenson por ĉiu atingita subteno. Bonvolu skribi al Fondumo Esperanto kaj peti detalajn

informojn kaj pretajn leterojn prezentotajn al la esperataj mecenatoj. Penu ankaŭ vi havigi almenaŭ kelkajn subvenciojn, se ne grandajn, almenaŭ de 3000 markoj! Estos via eterna honoro, ke ni povas publikigi la poezie valoran tradukon de Lep-päkoski, kiu disvastigos la famon da nia popolo kaj ĝiaj talentaj prapatroj!

Fondumo Esperanto, Matinkylä.

## STELO — INTERNACIA MONO

1946 Universala Ligo, kies organo estas La Praktiko, enkondukis por la uzado de la liganoj sub la devizo »unu mondo — unu mono» propran internacian monsystemon, en kiu la monunuo ricevis la nomon »stelo». Poste ankaŭ la esperantistoj ĝenerale ekinformas la prezojn de la libroj, revuoj ktp. en steloj. Ĝia kurzo aperas ekz. en la jarlibro de UEA (paĝo 420) kaj multfoje en la revuo de UL. En nia mono la valoro de unu stelo estas nuntempe 25 mk.

Sed la mono ne estas nur teoria. Jam longan tempon cirkulis ĝiaj malgrandaj, unu-stelaj monbiletoj, premio-kuponoj. Ĝi estas tute fidinda pagilo, ĉar en nederlanda banko — Nutsspaarbank, Haag — estas ĉiam deponita la plena valoro de la cirkulantaj en la mondo steloj en la nederlanda valuto. Ilian administradon kontrolas oficiala revizoro. UL aŭ ĝiaj reprezentantoj (ĉe ni rektoro Vilkki) kiam ajn je deziro reŝanĝas stelojn en plena valoro kontraŭ la landa valuto.

Stelo-kuponoj estas tre ŝatataj de la esperantistoj. Ili taŭgas por pagi malgrandajn sumojn eksterlanden. — provizore nur al esperantistoj tamen. Ili estas por la celo eĉ pli avantaĝaj ol en la poŝto aĉetebaj internaciaj respondkuponoj: ekz. en Britujo kontraŭ la lastenomita, kiu ĉe ni kostas 45 mk, la poŝto donas poŝt-

markon de 6 pencoj sed nur 25 markojn kosta stelo estas ankaŭ valora de 6 pencoj tie. En ĉiuj landoj stelo tamen ne estas tute tiel avantaĝa por ni, sed ĉiam ĝi estas pli valora ol la respondkuponon.

Por honorigi la Zamenhof-jubileon UL decidis farigi ankaŭ metalmone-rojn kiuj nun estas faritaj en la ŝtata monfarejo de Nederlando. Ili estas 3-valoraj: ruĝeta unu stelo, flava kvinstelo kaj arĝentkolora dekstelo. La moneroj estas tre belaj kaj tre taŭgaj kiel memoraĵoj por ĉiuj esperantistoj. Ilia komuna nominala valoro do estas 400 mk; por la registrita alsendo UL aldone prenas 75 mk po ĉiu 1—5 serioj. Se do pluraj faras komunan mendon, ili povas akiri la monerojn preskaŭ senkoste.

Ĉiu kiu mendas almenaŭ por 500 mk stelokuponojn, ricevas ilin sen ia poŝta elspezo; se vi mendos malpli, vi aldonu 30 markojn por la afranko. La mendojn faru al mi pagante al mia poŝtĝirokonto Tu 60 253 la koncernan sumon. Sed memoru ĉiam detale informi en la ĝiroŝlipeto kion vi per via mono deziras.

La Praktiko kostas ĉijare por la aktivaj membroj 825 mk aŭ libervole pli!

Joel Vilkki  
S O M E R O

### ALVOKO AL ESPERANTISTOJ EN HAVENURBOJ DE LA TUTA MONDO!

Ĉu vi volas partopreni servolaboron por niaj maristaj Esperantistoj, kiuj tre ofte malfacile interkontaktiĝas kun la diverslokaj samideanoj?

Ni intencas eldoni adresaron — espreble sufiĉe kompletan — por disdonado inter niaj maristaj Esperantistoj, tiel ke fariĝas al ili eble utiliĝi nian komunan lingvon. Por tio ni bezonas adresojn de samideanoj, kiuj en sia propra hejmloko volas servi al niaj maristaj samideanoj, kiuj ofte estas for de hejma tereno dum

longa tempo por pruvi, ke Esperanto estas utila ankaŭ por maristoj.

Certe tio ankaŭ, kaj por lokaj kluboj kaj por izoluloj, alportus novan instigon en la poresperanta laboro.

Skribu al: Kai Henriksen, Høyensgade 19, Kopenhago Ø, Danlando. aŭ al: M. Raposo, Poŝtkesto 872, Aw. Pinheiro Chagas, 155, 2 N:o 1, Lourenço Marques, Mozambiko, Orienta Afriko.

Anticipe ni dankas al vi sincere.

## LA LINGVO DE SANKTA LANDO

Sennombraj homoj estas interesitaj, kiun lingvon parolis Jesuo, apostoloj kaj iliaj samtempuloj.

Dank' al Esperanto mi konatiĝis kun afabla profesoro en Jerusalemo, J. Kohen-Cedek, per leteroj. Li jesis kaj diris ke li estas eksperto ankaŭ de **aramea lingvo**, kiu estis tre grava komerca lingvo dum la Persa registaro kaj eĉ la signoj sur la mezuriloj estis signitaj per arameaj literoj. Finna profesoro Aapeli Saarisalo, kiu vizitis la sanktan landon dekon da fojoj, diras en sia valora verko Raamatun Sanakirja, ke la aramea lingvo estis »facile legebla kaj bela«. La valoron de aramea lingvo, tiutempa Esperanto, konfirmas tio, ke ĝi vivis ĉirkaŭ 1000 jarojn. Ankaŭ ekzistas unu vilaĝo, dek kilometrojn norden de Damasko, Maalula, kie eĉ ekzistas du monaĥejoj, katolika kaj ortodoksa. Bedaŭrinde oni ne povas aĉeti la lernolibron de aramea lingvo. Mi admonis la katolikan pastron, uzi la aramean lingvon, kiu estas multfoje pli facilia ol la terure malfacila latina lingvo. Informoj parte de Yhteisvoimin, biblia vortaro kaj leteroj de Kohen-Cedek. Kelkaj arameaj vortoj de Jesuo esas konservitaj en kelkaj tradukoj de Biblio, kiel ekzemple abba = patro, effata = malfermiĝu, maranata = nia Sinjoro venas, talita kunumi = leviĝu knabino ktp. Kelkaj partoj de libroj Esra kaj Daniel estas originale verkitaj en la aramea lingvo, diras prof. Saarisalo. H. Salokannel

### RADIO-PROGRAMOJ DE LA VOĈO DE AMERIKO EN ESPERANTO

17 Marto — 24 Marto — 31 Marto —  
7 Aprilo 1961

En logika daŭrigo de la tria serio de Esperanto-programoj de la Voĉo de Ameriko, la kvara serio priskribas Usonon sub ĝia nova Prezidanto John Fitzgerald Kennedy en la kadro de la nuna situacio en Usono kaj la mondo. Sonbildo de gravaj okazajoj, raportoj, intervjuoj kaj la bone konata rubriko de Demandoj kaj Respondoj ilustras la

## UEA

Ĉiu membro pagu kiel eble plej baldaŭ sian kotizon por 1961 kaj prefere jam en tiu ĉi monato, por ke ne okazu interrompo en la sendado de la Revuo Esperanto. Ĉiu klopodu ankaŭ varbi unu novan membron. Al la plej multe varbitaj mi donos valoran libropremion kaj inter la aliaj almenaŭ 3 novajn membrojn varbintoj mi donos lotume tri pliajn libropremiojn (ĉ. 500 markajn!).

Ne forgesu informi vin kiel delegito en via loko aŭ fako. Mi petas ĉiujn al kiuj mi jam sendis la delegitan respondilon, ĝin nun tuj resendi plenigita por ke vi ankoraŭ en la jarlibro 1962 povu esti registrata. Estas grave havi delegiton en kiel eble plej multaj lokoj kaj fakoj, ĉar la delegita reto estas unu el la plej valoraj aranĝoj por valorigi nian movadon. Mi deziras, ke vi resendos ankaŭ la neplenigitan respondilon, se pro ia kaŭzo ne estus eble al vi servi kiel delegito — pro la vana modesteco ne rezignu fariĝi delegito!

Joel Vilkki

SOMERO

Poŝtĝirokonto: Tu 60 253.

bazan idearon, la programon kaj la gvidantajn personojn de la Kennedy-registaro kaj klarigos la rolon de la Prezidanto, de liaj ĉefaj kunlaborantoj, de la Kongreso, de la tribunaloj, de la politikaj partioj kaj de publika opinio.

Demandoj respondotaj en la rubriko de Demandoj kaj Respondoj devas esti ricevataj en Washington kiel eble plej frue.

Raportojn pri la ricevo, opiniesprimojn pri la enhavo kaj demandojn por la rubriko de Demandoj kaj Respondoj bonvolu sendi al D-ro William Solzbacher Voice of America, Rm. 2528 HEW, Washington 15 D.C., Usono.

### Tabelo pri la elsendhoroj

Tempo	Ondolongo (m)	Kilocikloj (kHz)
05.30—06.00	19.83	15.130
13.00—13.30	41.92	7.155
	16.92	17.735
14.00—14.30	19.72	15.210
24.00—00.30	31.20	9.615
	48.62	6.170

## NOVA LITERATURO

**SCIENCAJ STUDIOJ** — bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj — eldonita okaze de la 50-jara Jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista, sub redaktado de Paul Neergaard. 242 pp, prezo 15.— nederlandaj florinoj, havebla ankaŭ per la finna libroservo.

Jen unikaĵo: libro kiu enhavas altvaloran sciencan materialon en formo de tre kompetente verkitaj artikoloj de eminentaj esperantistoj-sciencistoj. La nombro de kunverkintoj estas 37, kaj tiuj reprezentas bonege la tutan mondon, ĉar landoj de origino estas 19, dividiĝante al ĉiuj kontinentoj. Inter la kunaŭtoroj troviĝas ankaŭ tri finnoj.

La libro estas dividita en du partojn: la unua estas **Humanisma**, ĝi enhavas artikolojn pri temoj lingvaj, historiaj ktp. La dua parto estas **Matematika-Naturscienca**, enhavante traktaĵojn el la kampo de natursciencoj: matematiko, fiziko, astronomio, zoologio ka estas tie reprezentataj.

Tiu ĉi libro estas vera montrilo pri taŭgeco de Esperanto, ĉar la lingvo de scienco devas esti tre preciza kaj senkonfuziga; en jena verko esperanto montriĝas tia. Kvankam preciza, la lingvaĵo neniel estas peza aŭ malfacila, ne, ĝi estas komprenebla kaj tute ĝuinda. Oni pensas nur, ke ĉiaj studoj estus granda ĝojo, se la lernolibroj estus similkvalitaj kaj — esperantlingvaj.

Ĉiu artikolo kunhavas resumeton en unu el la tri ĝenerale en ĝisnuna scienco uzataj lingvoj: angla, germana aŭ franca. Unu artikolo estas sekvata de ruslingva resumo. Preskaŭ ĉiu artikolo estas ĝuinda por ordinara laiko, sed troa popularigo tamen ne difektas la tre altvaloran **sciencan**, kiu nature laŭcele estas la ĉeftemo de la libro. Nur kelkaj artikoloj postulas iom da fakaj antaŭscioj.

Entute rekomendinda verko, kiu kunportas al ĉiu leganto efektivan universitaton por sineduko, sinevoluo.

### Arvikolo

André Ribot, **Grejzono** invitas vin (Grésillon vous invite)!

Ilustrita faldprospekto dulingva de la fama kastelo, kursejo kaj feripasigejo. Rakontas alloge la alvenon de tri gastoj kaj ilian ekreston por lerno. Oni ja rajtus postuli, ke la prospekto de tia institucio estu lingve senripoĉa. Sed ni devas fari rimarkojn pri tri gramatikaj eraroj, du troaj akuzativoj (ilin anstataŭas gefrancojn kaj estas kelkaj unu- kaj dultajn dormoĉambroj) kaj unu mankanta akuzativo (La aliaj... konsistigas komunaj dormoĉambroj). Krom tio la verkinto faris »novan« esperantan vorton simple aldonante finaĵon -o kaj supersignon: staĝo (ni supozas, ke la vorto signifas kurson, preparan por ekzameno, sed tute certaj pri tio ni ne estas. Sub bildo oni parolas pri »amatoroj de tablotenis«, kio ja estas francismo. En Esperanto amato ja estas nur persono, kiu okupiĝas pri arto neprofesie. Ĉar ne ekzistas profesio tablotenisa, kaj eĉ ne estas celo de la teksto akcenti la amatorecan okupiĝon pri tio, la ĝusta esprimo estus »ŝatantoj de tablotenis« (vidu ankaŭ la Franca-Esperantan vortaron de Grosjean-Maupin, ĉe 'amateur').

**Clave de Esperanto** (ŝlosilo de Esperanto, hispana). 4-a urugvaja eidono 32+8 p. 8,5\$12,5 sm. Piezo 1 resp.kupeno ĉe Urugvaja. Esperanto-Societo, Yaguaron 1397, MONTEVIDEO.

La verda duobla kovrilo enhavas ĝisdatajn informojn pri nia movado kaj la adresojn Esperanto-informejoj en la hispane parolantaj landoj eŭropaj kaj amerikaj.

Ni gratulas!

## LOISTOIDEA!



Maksamalla siirtille 8392 vain 350:- saadaan aikaan se, ettei lehtemme tulo katkea

## PRI MIA FERIO.

Lastan someron mi pasigis mian ferion en Katolika (Cattolica), urbeto sur bordo de Adria maro.

Italujo estas ideala feria lando, ĉar tie la somersezo daŭras tutan jaron. Kiel banloko, Katolika ne estis konata longtempe — nur kelkajn jarojn. Nun tie estas konstruitaj multaj modernaj hoteldomegoj, kaj la plaĝo estas plena de homamaso de ĉiuj nacioj.

Mi loĝiĝis en hotelo tute proksime al la plaĝo. Estis bona familia hotelo, kiel ofte en Italujo. Granda, dikkorpa Patro Monetti ricevis la vizitantojn, dum la filo Angelo prizorgis niajn valutojn kaj dokumentojn. Patrino Monetti laboris kun sia bopatrino en la kuirejo. Ili faris belegan kaj bongustan manĝaĵon. Katoliko estas konata pri sia bona kuirejo kaj pri malkaraj prezoj.

La aero estas eksterordinare pura kaj malpeza, kaj estas granda ĝojo naĝi en la sala maro. Iufoje estis altaj ondoj, kaj la naĝantoj devis vere batali kontraŭ ili. La bordo estis plena de malgrandaj boatoj kaj velŝipoj kun koloraj veloj. Mi veturis ofte en unu el ili, kaj la ŝipveturigisto kantis la tutan tempon per tenoro de operartisto. Li portis grandan, skarlatan pajloĉapelon, kaj liaj kruroj estis harkreskaj kaj kurbaj, sed lia mimiko kaj voĉo estis eksterordinaraj.

Ni faris ofte ekskursojn en la belegajn cirkaŭaĵojn de Katolika. San Marino, la malplej granda respubliko en la mondo, situas alte sur montpinto.

Iafoje en vespero mi sidis en iu malgranda stratkafejo, trinkis kafon ekspresan kaj auskultis al muziko kaj kanto.

Kaj kiam mi jam kuŝiĝis, kaj la malluma ĉielo estis plena de brilbelaj steloj, oni povis aŭdi ankoraŭ longtempe kantojn, ridadon kaj la potencan bruon de la maro.

Estis Italujo!

Irene

## NEGELFINO.

Petro sidis ĉe fenestro apud tablo. Lia kapo malleviĝis en apogo de liaj brakoj. Petro enuis. Li estis tute sola hejme.

Subite Petro ektimiĝis. Iu frapis kontraŭ la fenestro. Kiu li estis? Neniu estis vidata. Grandaj neĝeroj nur ŝvebis preter la fenestro. He, kio estis tio? Certe, ĝi ne estis ordinara neĝero. Ĝi ja estis neĝelfino: Ĝi havis neĝblankajn flagrajn harojn kaj la jupo estis mola nubeto. Belformaj manoj kaj piedoj fleksiĝis kiel en danco. La neĝa elfino rigardis Petron ridante kaj ekfrapis per sia piedeto denove kontraŭ la fenestro. Kop! Poste ĝi turniĝis ronde, ronde, supren kaj malsupren. Iam kaj tiam ĝi ekrigardis Petron kaj ridetis.

Korniko flugis krakante kontraŭ la neĝelfino. Ĝia buŝo malfermiĝis kaj la koro de Petro eksaltis subite. La korniko certe opiniis la neĝelfinon kulo. Sed ne — ĝi ne povis kapti la neĝelfinon per sia buŝo. Ĉi tiu ekflugis rapidege kontraŭ Petro kaj batiĝis fiksita sur fenestra vitro. Sed ho ve malfeliĉo! La elfino jetiĝis kontraŭ la fenestro kun tiel granda forto, ke ŝi mortis. Ŝia kapo ekpendis suben kaj la belformaj manoj kaj piedoj paraliziĝis sennervaj. Ŝi gilitis suben laŭ la fenestra vitro. Poste ŝi falis en la blankan neĝokruston sub la fenestro.

»Ho ve, mia neĝelfino!« ekkriis Petro dolore. Kaj ĝuste tiam la patrino eniris.

»Ĉu vi estas malsana?« demandis la patrino. Petro skuis sian kapon kaj nur la lipoj formis la vortojn.: Mia propra neĝelfino.

Verkis Esteri Tumi, trad. Niku Tumi.

## JA JARO EN LA NORDO

Per malluma januaro komenciĝas nova jaro.

Dum la vintra februaro gaje sportas la knabaro.

La serena, neĝa marto estas bona por la farto.

Vice pluvo kaj sunbrilo, jen printempo kaj aprilo.

Verdfolia estas majo, teron tegas flora gajo.

Nun somera mez', junio, kun la rozo kaj lilio.

Kaj en varma tag julia falas herbo trifolia.

Sed rikolton kun bongusto donas la monat' aŭgusto

Estas for somera suno, kun septembro jen aŭtuno.

En oktobro la folioj falas kun kolorserioj.

Jen novembro jam alvenas, pluvoj kaj nebuloj ĝenas.

En decembro mallongiĝas tagoj, kaj la jar' finiĝas.

## KLASEKSKURSO.

Dum pasinta printempo ni, la tuta klaso faris ekskurson. Ni decidis, ke ni iras al unu parko de Tammela. Tammela estas najbara paroĥo al nia paroĥo Somero.

Estis tre bela tago en majo, kiam ni volis iri al Tammela. Ĉiuj havis tre multe da porvojaĝaj nutraĵoj. Ankaŭ nia Esperanto-instruistino Wheatley kaj nia klasinstruistino S-ino Parko venis kun ni. Estis tre ĝoja impresoj kaj ni parolis pri ĉio ajn. Post longa atendado venis nia aŭtobuso. Ni ĉiuj volis havi tre bonajn lokojn, kaj pro tio ĉiuj puŝis unu la alian. Fine ni povis ekveturi.

En la aŭtobuso estis granda bruado. Kelkaj kantis, kelkaj parolis, kriis, ĉiuj bruis.

Baldaŭ ni estis en la urbeto Forssa. Tie ni estis mallongan tempon. Ni aĉetis glaciaĵojn kaj memoraĵojn. Ni fotografaĵis kaj kelkaj iris por rigardi la preĝejon de Forssa.

Post duonhoro, kion ni estis en Forssa, ni reiris en la aŭtobuson kaj veturis al la muzeo kaj terkulturista lernejo de Mustiala.


En Mustiala ni estis, eble unu horon. Unue ni rigardis la ĉirkaŭaĵon. Ĝi estis tiel bela parko! Post tio ni iris al la muzeo, havanta du etaĝojn. Tie estis tre multaj malnovaj objektoj.

En la lasta parto de nia ekskurso ni restis longe. Ni naĝis, ludis, ni faris ĉion eblan. Tie estis ankaŭ unu elvida turo. De tie ni povis admiri finnajn pejzaĝojn. Je la kvina horo ni forveturis, kaj iris al la sportinstituto de Eerikkilä. Tie ni ankaŭ banis kaj ludis. Poste ni iris sekvante mallarĝan montoĉenon al la ŝoseo. Kaj de tie hejmen.

Marjo Heino, 12-jara.

## LA FAGOTO

Fagoto estas blovmuzikilo, kiu eligas tre malaltajn tonojn. Kiam Max Reger dirigis koncerton en Munkeno, okazis, ke dum la paŭzo la orkestranoj agordis siajn instrumentojn. Iu princino, kiu estis fama pri siaj akraj rimarkoj, demandis al Reger, montrante la fagotiston, ĉu la ludantoj vere buŝe eligas tiajn terure malaltajn tonojn en la fagoto. Kun tre profunda kaj ĝentila riverenco la fama orkestrestro respondis: »Via moŝto, tion mi vere tutkore esperas!«



# VALTATIE KIELITAITOON

(privilegia vojo al lingvoscio:  
Esperanto)

Oppikirja, jonka avulla luonnonmukaisesti ja ilman muita apuvälineitä opitte kansainvälisen kielen, Esperanton, vähin ponnistuksin ja hauskasti. Kirja on näppärää taskukokoa ja kuvitettu iloisin, mukaansatempaavien kuvien.

Universala Esperanto-Asocio (UEA) on tilannut kirjasta uuden painoksen kansainvälistä käyttöä varten.

Suomalaista laitosta myy:

**ESPERANTO-SERVO,**

Pajupillintie 26 A 1.

**ETELÄ-KAARELA,**  
siirtotili 6117.

Kirjan hinta 1. 3. 1961 alkaen  
vain mk 380:—

Lisäetuja kirjan ostajille:

**ESPERANTA FINNLANDON**  
vuosikerran saa satasen alennuksella, siis hintaan 250:—

**NOTO:** En la tabelo de elsendhoroj de Voĉo de Ameriko (paĝo 13) estas memorinde, ke el la elsendoj nur la lasta estas direktita por aŭskulto en Eŭropo, sed dependante de atmosferaj cirkonstancoj ankaŭ la aliaj elsendoj povas esti aŭdataj ĉe ni.

